nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2024

## SUBSKRIBADO EN LA LIBROFOIRO

Du esperantaj aŭtoroj subskribos siajn verkojn dum la ĉijara Librofoiro de Madrido.




Miguel Fernández subskribos ekzemplerojn de sia nova libro "La palabra y el viento", versio en la hispana de noveloj el lia originala verko en Esperanto "La vorto kaj la vento" (eldonita de Mondial), elektitaj kaj hispanigitaj de la aŭtoro mem. La tago estos la 1-a de junio, de la 18,00 ĝis 19,30 horo, en la budo 107 de la eldonisto Lastura Ediciones.

Jorge Camacho subskribos ekzemplerojn de sia verko "Palestina estrangulada", kiu ankaŭ havas version en Esperanto. Li ĉeestos du fojojn, la 1-an de junio de 17 ĝis 19 horo en la budo 76 (librejo Diwan) kaj la mardon 11-an de junio de 17 ĝis 19 en la budo 77 (librejo Balqís).

## ANKAŬ EN LA RADIO

La 31an de majo, Armando Silles McLaney, poeto kaj gvidanto de la programo "Olvida tu equipaje" (Forgesu vian bagaĝon), kiun li gvidas ĉiuvendrede ĉe la madrida Radio Utopía (Radio Utopio), dediĉos la tutan programon al intervjuo kun la E-verkisto Miguel Fernández surbaze de ties novel-libro "La palabra y el viento" antaŭnelonge publikigita de la madrida eldonejo Lastura. La programo aŭskulteblos rekte, ĉe Radio Utopía - 107.8 FM, de la 19,00 ĝis la 20,30, kaj podkaste ĉe la retejo de la stacio.

## OMAĜO AL LORCA EN SEGOVIO

La sabaton 25-an de majo la t.n. Foro Social de Segovia aranĝis omaĝon al Federico García Lorca, al kiu, inter aliaj, estis invitita Miguel Fernández kiel tradukanto de Lorca en la lingvon Esperanto kaj kiel E-verkisto. Ĉeestis ankaŭ la origine segoviano Manolo Parra. Koincide, la prezidanto de tiu asocio Foro Social estas bofilo de César de Mosteyrín, iama esperantista aktivulo en Segovio kaj instruisto de Manolo.



La omaĝo al Lorca havis lokon en antikva preĝejo, San Quirce, transformita en kulturejon. La paroladoj, inklude de tiu de Miguel, fariĝis de sur la eksa predikejo (vidu foton). Krome, oni projekciis videaĵon senditan de alia konata esperantisto, David Galadí, kiel familiano de unu el la du anarkiismaj banderilistoj pafmortigitaj kaj enterigitaj kun Federico.

Raporto pri la evento, kun pliaj fotoj, aperas en la retejo de la asocio, ĉe: https://forosocialsg.blogspot.com/2024/05/homenaje-federico-garcia-lorca-aula-san.html (kun erareto en la familinomo de la banderilisto)

## VIZITIS NIN

La 22-an de majo vizitis Madridon konata esperantisto Mikaelo Lineckij, devenanta el Ukrainio kaj loĝanta en Israelo. Li restis mallonge, survoje al la valencia marbordo, sed havis la ŝancon renkontiĝi kun lokaj esperantistoj.

## MATERIALO POR FILIPINOJ

En julio nia samurbano Albert S. Garrido reiros al Filipinoj, interalie por partopreni la renkontiĝon de la Filipina Esperanto-Junularo, FAJRO-2024, pri kiu vi povas informiĝi pli ĉe: https://esperanto-ph.org/fajro-2024. Li volonte portos kelkajn esperantaĵojn por donaci al la asocio kaj al individuaj esperantistoj. Se iu el vi volas kontribui, bv kontakti kun li (albertstgarrido[ce]gmail.com) aŭ kun Liceo.




## UNESKO-KURIERO EN ESPERANTO

"La kuriero de UNESKO" estas unu el la plej kvalitaj revuoj nun legeblaj en Esperanto, krome senpage en reta versio. La ĉeftemo de la plej lasta numero estas "Edukado en la epoko de artefarita intelekto".

La numero estas elŝutebla el la retejo de UNESKO pere de: https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero aŭ rekte ĉe la adreso: https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000387029_epo (post "Full text" klaku en la ikonon kun sago malsupren por ĝin elŝuti en pdf)

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

Ni kunvenas denove ĉiulunde de la 18,30 en la sidejo.

La sabata kunveno okazos ne la unuan sabaton, sed la 8-an de junio, je la 18:30, ĉe Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

## GRUPOJ KAJ KANALOJ EN ŬASAPO

Memoru ke, kiel ni anoncis en la pasinta numero, ekzistas grupo de ŭacapo (whatsapp), sufiĉe aktiva, por la madridaj esperantistoj. Vi povas aldoniĝi al la grupo per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Krome, ni invitas vin aliĝi al la nova kanalo de ŭacapo, malfermita en majo, pri novaĵoj kaj diversa materialo kiun vi povas ricevi ĉiumonate. Klaku en la ligilo https://whatsapp.com/channel/0029VafOLdoKGGG9k4T16m3N.

## SOCIAJ RETOJ KAJ RETEJOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com